Dumonata kultura informilo kaj esprimilo esperantista
N° 44 (62) - Septembro/Oktobro 1982 - Prezo : 3 FF

ISSN 0150-5823

# laŭte!

Unujara abono kun adresaro : 18 FF
al la poŝtkonto n° 3 371 74 M BORDEAUX de la eldonanto :
Cercle espérantiste de l'Agenais, F 47340 LAROQUE TIMBAUT

## "L A Ŭ T E !"
## O F S E T I T A ...

El la tricela revo iam esprimita por "Laŭte!" parto estas nun atingita.

- Nia bulteno fakte internaciiĝis. Kvankam malrapide, la nefranca parto de la abonantaro iom post iom plimultiĝas : de 4% en 1978 al 25% ĉi-jare. Tiu evoluo okazas kun samtempa kreskado de la tuta abonnombro, do ankaŭ en Francio, kie estas nun duoble pli da legantoj ol en 1978.
- La konsekvenca plialtiĝo de la eldonkvanto igas interesa la uzadon de ofsetilo kiel presrimedo. Jen do la unua numero tute ofsetita. La ofsetilo estas ja tre ordinara kaj brokante akirita. La ofsetanto preskaŭ... same.
- Fidelaj malnovaj gelaŭtuloj memoras pri la lasta celo : ĉiumonateco de "Laŭte!". Kvankam tiun rev-eron ni ne forlasas, ni preferas nun - pro ekonomiaj kaŭzoj - minimume 36-paĝajn kajerojn dumonatajn, ol maldikajn numerojn, por kiuj necesus pagi altan afrankon ĉiumonate.

Ĉio tio tamen ebligas al nia modesta bulteno plenumi sian etan sed ne tute senvaloran rolon en Esperantio. Pli ol iam ajn "Laŭte!" estu via informilo kaj esprimilo ! Almenaŭ bondeziras al vi tion la red.

Kribo.

*************************************************************************

S.A.T. - Broŝurservo

*************************************************************************

* La kvara eldono de "Kiel diri...?" estas disponebla ! (do jam 2000 ekzempleroj...!). Tiuokaze la tuto estis korektita kaj retajpita per aliaj litertipoj. Aliaj plibonigoj : paĝnumeroj supre kaj ĉapitronumeroj malsupre de ĉiu paĝo faciligas la uzadon. Fine, tabelo de la ĉefaj ideoj. La vendprezo restas stabila : 1 ekz. 15 FF + afranko (en Francio : 5,80 ; aliloke : 2,90). Ekde 4-ekzemplera mendo la afrankon ne pagu. 20% rabate por libroservoj.

* "Historio de SAT 1953/1981" estas elĉerpita ĉe la BS. De nun mendi ĝin al SAT, 67 av. Gambetta, F 75020 Paris.

* "Les seize règles de l'espéranto commentées par un espérantiste français à l'intention des élèves francophones" (kodo: SR) : jen nova broŝureto (32 paĝoj en A6-formato) por franclingvanoj, ofsetita. La aŭtoro estas fervora kunlaboranto de "Laŭte!" kaj SAT-Broŝurservo. Jen ekstrakto el la enkonduko : "Ce qui est difficile pour l'élève francophone comme pour tout autre, ce n'est pas de comprendre et d'apprendre les règles de l'esp-o, mais de se débarrasser des habitudes contractées dans la pratique de sa langue maternelle. Notre propos est simplement d'attirer son attention sur ce fait constant, en reprenant dans l'ordre et dans le texte même de Zamenhof ...ces fameuses "16 règles" dont on parle souvent sans les avoir lues...."
Vendoprezo : 2 FF + afranko. Por 10-ekzemplera mendo : 20 FF, sed la afrankon ne pagu.

*************************************************************************

Libro-servo de A.E.R.A.

*************************************************************************

Elĉerpitaj : Nouveau cours rationnel (bindita)
Vojaĝo al Kazohinio

AERA-Libroservo peras la mendojn por la libroj riceveblaj el Japanio (vd. p.2 de L! n-ro 42). La libroj estas sendataj rekte el Japanio, sed ŝipposte, do alvenas nur post kelkaj semajnoj. Paciencu la interesatoj !

Por libroj aŭ broŝuroj sendotaj de nia grupo la ekspedo okazas tuj kiam alvenas la mendoj per ordinara poŝto. Por urĝa sendo (tion peti!) la mendantoj pagas la kromkoston.

Denise Castelló

# eŭtanazio

## kaj certaj aspektoj de la medicino

(Teksto verkita en 1966)

Se estas problemo pri kiu estas malfacile fari al si opinion definitivan kaj komfortan, ĝi estas ja tiu de eŭtanazio. Kiam oni iom profundigas la demandon, konsideras ĉiun kazon, la argumentojn por kaj kontraŭ, oni baldaŭ troviĝas en memkontraŭeco. Tio estas, ĉar antaŭ eŭtanazio ni sentas nin premitaj inter du timegoj : igi morti estas terure, lasi suferi kruele kaj longe - kaj senespere - estas monstre kaj malhumane. Ni volus, ke oni montru al ni la senriskan vojon sur kiu ni povus delasi ĉiujn niajn dubojn ; sed tiun vojon ni mem devas trovi.

Nur en la nuntempo la demando pri eŭtanazio akrece stariĝas antaŭ la homoj. Iam oni ne sin embarasis per tiaj ĝenaj subtilaĵoj. Preskaŭ ĉie en la mondo oni senindulge forpasigis la malsanulojn kaj maljunulojn. La Hindoj dronigis la nekuraceblulojn en Gango dum religiaj ceremonioj ; en iuj ĝermanaj regionoj oni ilin enterigis vivantaj kaj en Bretonio oni batmortigis per "benita martelo" tiujn konsideratajn kiel nevivkapablajn. En la tempo de la Grekoj, kies civilizacio estis aliflanke tiel rafinita, Platono skribis en "La Respubliko" : "Ĉiu civitano havas plenumendan devon en ĉia ŝtato bone ordigita ; neniu havas permeson trapasi sian vivon en malsanoj kaj kuraciloj. Ci starigos, ho Glaukon, en la ŝtato tiajn disciplinon kaj jurisprudencon laŭ niaj intencoj, sin limigantajn per flegado al civitanoj kun bona konstitucio korpa kaj anima. Kiuj

ne estas korpe sanaj, tiujn ni lasos morti"... Pli proksime de ni, komence de la XVIa jarcento, Tomaso Morus skribis en "Utopio" : "Se la malsano estas ne nur nekuracebla sed plena je akraj doloroj kaj daŭraj angoroj, la pastroj kaj juĝoficiroj devas esti la unuaj por admoni la malfeliĉulojn al mortodecido. Ili montras al ili kiel, ne plu estante utilaj en tiu ĉi mondo, ili malprave pluigas pestosimilan kaj doloriĝan vivon kiu igas ilin malfeliĉaj kaj neeltenebiaj por la aliaj." Koncepto ne malpli kruela ol tiu de Platono. En ambaŭ kazoj oni ne domaĝas la vivon de la malsanuloj en la intereso de la bonfartantoj !

Iom pli malfrue (fine de la XVIa) Francis Bacon konceptos la ideon pri dolĉa kaj humana morto, kaj estas li cetere, kiu kreos la vorton eŭtanazio. "Mi opinias, li diris, ke estas funkcio de la kuracisto redoni la sanon kaj dolĉigi la penojn kaj dolorojn, ne nur kiam tiu dolĉigo povas konduki al resaniĝo, sed ankaŭ kiam ĝi povas helpi al kvieta kaj facila morto."

Montanjo kaj Voltero estis partizanoj de eŭtanazio ; Paskalo kaj Rousseau estis kontraŭ. En nia epoko la opinioj estas tute same disdividitaj : partizanoj kaj kontraŭuloj havas argumentojn same konvinkajn. Profesoro Charles Nicolle skribas : "La rolo de la praktikisto restas antaŭgardi la vivoflamon kaj ne ĝin estingi. Se en certaj cirkonstancoj sekrete kaŝitaj en ilia konscienco, iuj kuracistoj cedis al la insistaj admonoj de malsanuloj, tio estas ĉar ilia homa sentemeco superis la profesian devon. Oni povas ilin admiri. Oni ne povas ilin aprobi : ili estis samtempe herooj kaj perfiduloj, kaj laŭ religia vidpunkto malbonaj kristanoj." Sed sin demandas D-ro Lavallée "ĉu endas admiri aŭ kompati tiujn, kiuj nome de metafizika koncepto kruele kuraĝas senindulgi kaj forlasi samulon al ties sorto."

Tamen kuracistoj, kies ĉiutaga spektaklo estas la sufero, kiuj ĉeestas multnombrajn kruele doloriĝajn mortojn, plejparte rezistas al tio, kion oni nomis "la tento de eŭtanazio", strikte obeante la profesian devon.
La kredantoj ĝenerale sin lokas malantaŭ la dogmo kiel malantaŭ remparo : "Ci ne mortigu", kaj neniel volas ion alian konsideri.



Tamen la du starpunktoj estas proksimume egale disdividitaj ĉe la laikoj en medicino. Sed la aliaj, la ĉefaj interesatoj : la malsanuloj mem ? Oni defendas kontraŭajn kaj definitivajn opiniojn sen zorgi pri tio kion ili pensas. Tamen kiu, ne ĉeestinte dum tagoj kaj noktoj la malrapidan kaj doloriĝan agonion de kara estaĵo ; kiu, ne elportinte mem kruelan kaj longegan suferon, povas arogi al si juĝi la aferon ?...

° °
°

Mi nun parolos pri enketo farita de Igor Barrère kaj Etienne Lalou, aperinta antaŭ kelkaj jaroj en "France-Soir". La du ĵurnalistoj ricevis milojn da plej emociaj leteroj. Leteroj apenaŭ legeblaj el malsanuloj alvokantaj la morton, leteroj el personoj praktikintaj eŭtanazion sur amata estaĵo, el aliaj, tion rifuzintaj ; leteroj el kuracistoj inter kiuj kelkaj estas partizanoj de eŭtanazio kaj iafoje ĝin praktikis, aŭ helpis, aŭ sugestis.

Mi ne volas ĉi tie vicigi la ekzemplojn, sed nur diri la jenon : post legado de ĉiu letero - kaj ĉiu eligas kriojn de doloro kaj vero elirintaj el la fundo de l'animo - oni estas konvinkita :
Ĉu eŭtanazio estis praktikita ? Estis neeble fari alie, oni estus same farinta se nur oni tion kuraĝus, ĉu temas pri longa martiriĝo de kancerulo aŭ pri ĉia alia hida kaj kruela malsano, ĉu temas dum militoj - kiam soldatoj troviĝas izolitaj for de ĉia helpo kaj atakitaj - pri homoj kun krevigita ventro, eĉ palisumitaj, kondamnitaj al kruela kaj certa morto...
Ĉu eŭtanazio estis male forpuŝita ? Kia kormalpezigo ! Temis pri paroksisma krizo kaj spite esperforeston la malsanulo povis vivi ankoraŭ kelkajn jarojn ; aŭ li povis parte resaniĝi kaj rekomenci vivon preskaŭ normalan aŭ malpli aktivoriĉan, ja, sed kiu liveras ankoraŭ multajn ĝojojn kaj kontentigojn. Eĉ iafoje, en iuj maloftaj kazoj, li estis mirakle savita aŭ neatendita helpo alvenis ! Kaj en ĉi tiuj kazoj eŭtanazio estintus krimo !

Estas io rimarkinda : plej ofte la opinioj kaj

principoj neniel efikis en ĉeesto de la tragika situacio : ĉe konvinkitaj katolikoj la doloro vidi senespere suferi karan estaĵon estis iafoje pli forta ol la Dia ordono. Aliaj, nekredantoj aŭ partizanoj de eŭtanazio, iafoje ŝanceliĝis, subite sentante la gravecon de la ago kaj mankis al ili forton kaj kuraĝon ĉe la lasta momento. Kaj kuracistoj, rezolutaj kontraŭuloj de eŭtanazio, kiel la plejmulto el ili, tamen ĝin praktikis unu fojon en kazo "vere escepta".

Fakte ĉiu reagis, ne laŭ principoj, kredoj aŭ opinioj, sed laŭ la vero de sia profunda memo, rivelita de la cirkonstancoj. Sed por la plejmulto la afero ne fariĝis sen terura interna lukto. Ĝenerale kuraĝo kaj animforto necesas por praktiki eŭtanazion.

Kiaj estas la reagoj post la terura evento ? Iuj neniam pardonos al si mem. Iuj eĉ ne povas elporti la pezon de sia ago kaj sin mortigas. Iuj estas feliĉaj, ĉar ili ne cedis al la tento ; kontraŭe aliaj rimorsas pro tia necedo. Tamen la plej granda nombro el tiuj, kiuj praktikis eŭtanazion, ne bedaŭras ; ili rekomencus se necese ; sed ili restas stampitaj de sia ago kaj konservas ie en si mem pezan ŝarĝon. Paroli pri tio okaze de tiu enketo estis por preskaŭ ĉiuj kormalpezigo.

°°°

En la ĉi-supraj kazoj, temas pri personoj, kiuj povis agi sekrete kaj ne devis respondi pri sia ago antaŭ la justico. Ili do estas kazoj iel nekompletaj. Al la literaturo mi pruntos ekzemplon pli kompletan, kaj mi parolos pri romano de la belga verkisto Charles Plisnier "La morto de Izabela".

La historio okazas en 1922. Izabela estas trafita de rektuma kancero. Jam de longaj monatoj ŝi suferas kruelajn dolorojn kaj petegas sian edzon Noel, ke li ŝin mortigu. Nu, iam Noel, kiu ĉion forlasis por trapasi ĉiujn tagojn kaj ĉiujn noktojn apud sia vivkunulino, por senĉese alporti al ŝi flegadon, amon, konsolon, kuraĝigon, Noel antaŭ tiom da suferoj, krioj, petegoj, decidiĝas kaj dekroĉas ĉaspafilon. Post la pafo kaj morto de Izabela, Noel sin prezentas antaŭ la polico. Lia konfeso ĉe la enketa juĝisto estas korŝira ; ĝi sonas kiel la leteroj senditaj al Barrère kaj Lalou. Li priploras sian edzinon kiun li amis, sed ne bedaŭras sian agon ; male, li alte depostulas la respondecon pri ĝi kaj antaŭe akceptas la punon. Kaj tiu depostulo kaj tiu konsento redonas al Noel lian homan dignon, faras el li ne krimulon sed malfeliĉulon, kiu devis suferi kruelan, eble superhoman sperton.



En tio ĉi ni eble trovos respondon al niaj demandoj.

°°°

Oni povas havi pri eŭtanazio bone difinitan opinion konstruitan en la abstrakto aŭ rezultantan el onia persona sperto pri la vivo, la sufero kaj la morto. Sed kiam oni sin klinas super tiom da kazoj el kiuj ĉiu estas kazo aparta, la certeco ŝanceliĝas...

Kredas mi, ke nia plej nepra devo antaŭ tiu, kiu baldaŭ mortos, estas lin helpi vivi sian vivon ĝis la lasta guto. Ni kredu je la vivo, je lia vivo kaj ni forpuŝu for de nia spirito la primortan penson tiom longe dum la morto ne ĉeestas. Eĉ kaj precipe se la malsanulo scias, ke li estas mortonta, en la momento kiam li estas vivanta, ni devas vivi - kaj suferi - kun li. Nur tiu interna dispozicio permesas havi la taŭgan sintenon por efike helpi la malsanulon elporti sian malfacilan situacion. Se la doloro fariĝas neelportebla kaj ne mildigebla, se la mortanto mem petas, ke oni finmortigu lin, en tiu ĉi momento, kaj nur en tiu ĉi momento, estas tempo meti al si demandojn. Ĉu la malsanulo certe estas senrimede kondamnita, ĉu li vere deziras tuj fini sian vivon, aŭ ĉu estas nur krio inter aliaj ? La vivinstinkto estas tiom pli forta ol la mortodeziro... Alia demando : ĉu urĝas nin meti finon al alies suferoj aŭ al spektaklo kiun ni mem ne plu povas elteni ?...

Kiel ajn estu, tiu, kiu troviĝas en tia tragika situacio, devas decidi kun si mem, kun sia konscienco, kun siaj kredoj, siaj principoj kaj akcepti la tutan respondecon pri sia konduto. Nur tiupreze la eŭtanaziago povas trovi pravigon. Povas ĝin dikti nur profunda sento de amo kaj frateco, kaj senartifika konscienco.

°°°

Certe, tio ĉi ne estas la atendita respondo. Oni volas scii ĉu la leĝo devas permesi la praktikadon de eŭtanazio, kaj en kiaj kondiĉoj. Sed ĉu unu leĝo ŝanĝus ion en niaj profundaj reagoj antaŭ sufero kaj morto ? Favora leĝo nur faciligus la aferon al la partizanoj de eŭtanazio ; por la aliaj la problemo restus nesolvita. Aliflanke, ĉiu kazo estas, mi ĝin ripetas, aparta kazo, kaj ĉio devas esti ĉiufoje denove pripensita. Kaj ĉu leĝo permesanta eŭtanazion ne estus pordo malfermita al malbonuzoj, al krimoj pro intereso aŭ venĝemo ?

Oni parolas pri konsilio el kuracistoj ŝarĝita fari la decidon kaj ĝin apliki. Sed estas danĝere doni al iu ajn rajton de morto super siaj samuloj, ĉar ĉiam estas timendaj malbonuzoj aŭ eraroj ; kaj kial trudi al kuracisto tiun kroman ŝarĝon kiu metos lin antaŭ la insistado de familioj ne ĉiam skrupulaj ? Aliflanke, se la kuracisto estas profesie kompetenta, morale li estas homo samkiel la aliaj. Li agu nure laŭ sia konscienco sen la leĝa protekto ; tio konsistigas garantion kontraŭ la facileco. Ni ankoraŭ diru, ke tiu praktiko postulas same de la familioj kiel de la kuracistoj altan moralan valoron. Ĉu la leĝo povas certigi, ke tiu ĉi kondiĉo ĉiam estos ekzakte plenumita ? Fine, ni denove pensu pri la ĉefa interesato : la malsanulo. Kiel li plufidus sian kuraciston ? Kiel li ne pensus, ke la injekto, kiu devas mildigi lian doloron, fakte estas, kaj intence, la lasta ?...

°°°

La franca leĝaro ne permesas eŭtanazion ; sed kiam tiu ĉi estas bone pruvita la juĝistoj ne kondamnas. Ni saĝe kontentiĝu per tiu kompromiso. Ĉar malgraŭ la leĝo, eŭtanazio estas praktikata pli ol oni tion kredas. Oni do povas sin demandi kio okazus, se la leĝo ĝin permesus.

Sed kial peti de la leĝo iun solvon, kiam la medicina scienco progresas, kiam ĝi estas - eble - ekmalkovronta la rimedon kontraŭ la kancermalsano ? La serĉatan solvon ni devas atendi de la medicino. Ĝi jam posedas aregon da sendolorigaj medikamentoj kaj eĉ la kancerdoloroj, konsiderataj kiel la plej kruelaj, povas esti venkitaj preskaŭ ĝis la fino (ni ne plu estas en 1922). Kuracisto diris al mi, ke li flegis kancerulon dum dek unu monatoj ; la malsanulo konservis siajn okupojn dum dek monatoj kaj duono kaj enlitiĝis nur du semajnojn antaŭ ol morti ; dum tiuj dek monatoj li preskaŭ ne suferis kaj li kredis sin sur la vojo al resaniĝo. Li estis traktita per kobra veneno, kiu estas ankoraŭ malmulte utiligata, ĉar ankoraŭ ne sufiĉe preta. Estas do espereble, ke en tempo kiel eble plej proksima, oni liveros al ni la idealan rimedon : tiun, kiu malpliigos la fizikan doloron lasante lucida la cerbon.



Ĉar morti estas nenio ; sed suferi por morti estas la lasta maljustaĵo, kiom kruela kaj indigniga - farata al la homo.

°°°

Ĝis nun mi parolis pri eŭtanazio praktikata ĉe la vivofino. Sed ankaŭ estas eŭtanazio praktikata ĉe la naskiĝo laŭ radikala eŭgenikismo.

Antaŭ ol tuŝi tiun flankon de la demando, ni provu difini la sencon de la vortoj "respekto al la vivo". Ĉu temas pri respekto al ĉio kreita de la naturo, bona aŭ malbona, liveranta ĝojon aŭ suferon ? Aŭ ĉu temas pri respekto al la digno de la vivo ?

En la naturo, la animaloj forĵetas la misformitan idon, kaj obeo al la naturo ordonus al ni fari same. Sed la homo, kiu sin levis super la animalo, forrifuzas tian kruelan faron. Tamen, ĉu estas malpli kruela lasi vivi monstrajn infanojn, kiuj dumvive estos homaj senvaloraĵoj ? Beboj trafitaj de encefalito aŭ de aliaj malsanoj aŭ misformiĝoj, kiuj igos ilin idiotoj ? Foksimiluloj, kompatindaj estaĵoj nefinitaj, kiuj daŭre vivos en plena kaj absoluta dependeco de aliuloj, en situacio kiun imagi sen tremi oni ne povas ? Ĉu oni devas lasi ilin vivi ? Mi spontane respondas : ne! Lasi ilin vivi, aŭ pli verdire vegeti, ĉu tio ne estas atenci la vivodignon ?

Kaj tie ĉi, inter la animala faro ilin forlasi al malfeliĉa sorto, kaj la malhumana ago ilin destini por vivo nenormala, doloriga, malbela, senutila, la eŭtanaziago trovas lokon. La volo de la patrino devus

sufiĉi por ĝin decidi.

Tamen, ĉu oni petu de la leĝo permesi eŭtanazion ĉe la naskiĝo ? La demando estas ege grava kaj delikata. Ĝi ne plu estas : ĉu ĉesigi neelteneblan suferon, ĉesigante la vivon, kiu jam alproksimiĝas al la fino, sed: ĉu haltigi vivon jam ĉe ties unuaj paŝoj por eviti longan martiron ? Sed en okazo de eraro, en okazo de ebla resaniĝo ? Ĉu malhelpi ekaperon de vivo, kiu povus esti tre valora kaj feliĉa ? Tuta estonteco estas riskata.

Ankoraŭfoje, ĉu favora leĝo ne sekvigos facilecon kaj malbonuzon ? Ni memoru la proceson en Lieĝo, kiu estis vaste publikigita. Suzanne Vandeputte estis absolvita; (tio ĉi nepre necesis, ĉar ne ŝi estis la vera respondeculo sed ja la "Thalidomide", kiu estigis pli ol sep mil monstrajn naskiĝojn en Eŭropo). En la monatoj post la proceso oni plurfoje povis legi en la gazetoj jenan titolon : "Nova dramo de eŭtanazio". Kvazaŭa kontaĝo. En unu kazo, patrino forpasigis sian malsanan infanon jam naŭjaraĝan ! Tio ĉi montras kiom endas esti singarda pri la leĝo kaj la publikigo de tiaj aferoj.

Mi ja scias, ke nur la kuracistoj havus la permeson praktiki eŭtanazion. Estas tamen vere, ke leĝo permesanta eŭtanazion ĉe la naskiĝo de nenormaj infanoj, tio estus malfermi pordon al ekstreme danĝera vojo : ekde la momento kiam oni konsentos pri tio, ke iuj etuloj povas kaj devas morti, ĉu oni povos al tio meti finon? Unu paĝo de D-ro Alexis Carrel en "La homo, kiu nekonato" ĝin ekvidigas al ni :

> "Ankoraŭ staras la nesolvita problemo de la amasego da menskonfuzuloj kaj krimuloj. Ĉi tiuj ŝarĝas per ega pezo la sanan loĝantaron. La kosto de la prizonoj kaj frenezulejoj, de la publika protektado kontraŭ la banditoj kaj la frenezuloj fariĝis, kiel sciate, giganta. La civilizitaj nacioj naive klopodas por la konservado de senutilaj kaj nocaj estaĵoj. La nenormuloj malhelpas la disvolviĝon de la normuloj. Estas necese rigardi fronte al tiu problemo. Kial la socio ne pli ekonomie disponus pri la krimuloj kaj frenezuloj ? Ĝi ne povas daŭre pretendi distingi inter la respondeculoj kaj nerespondeculoj, puni la kulpulojn, tiujn indulgi kiuj faras krimojn, pri kiuj ili estas morale nekulpaj. Ĝi ne estas kapabla juĝi la homojn. Sed ĝi devas sin protekti kontraŭ la danĝeruloj. Kiel ĝi tion povas fari ? Certe ne konstruante prizonojn pli grandajn kaj pli komfortajn. Same kiel la sano ne estos plibonigita per la konstruo de pli grandaj kaj pli sciencaj hospitaloj. Ni malaperigos la frenezon kaj la krimon nur per pli bona kono de la homo, per eŭgenikismo, per profundaj ŝanĝoj en la edukado kaj sociaj kondiĉoj. Sed tion atendante, ni devas efike okupiĝi pri la krimuloj. Eble endus forigi la prizonojn. Ili povus esti anstataŭigitaj per institucioj multe pli etaj kaj malpli kostaj. La kondiĉigo de la krimuloj per la vipo aŭ per ajna alia rimedo pli scienca sekvata de mallonga restado en hospitalo probable sufiĉos por certigi la ordon. Rilate la aliajn, tiujn, kiuj mortigis, kiuj ŝtelis kun armita mano, kiuj forrabis infanojn, kiuj priŝtelis la malriĉulojn, kiuj trompis la konfidon de la publiko, eŭtanazia establo provizita per taŭgaj gasoj permesus ilin disponi pli humane kaj ekonomie. Ĉu la sama traktado ne estus aplikebla al la krimintaj frenezuloj ? Endas ne heziti ordigi la socion rilate la sanan individuon. La filozofiaj sistemoj kaj la sentimentalaj antaŭjuĝoj devas malaperi antaŭ tiu neceseco. Se ĉion konsideri, la superega celo de la civilizacio ja estas la disvolviĝo de la homa personeco."



D-ro Carrel parolas pri krimuloj, frenezuloj, nenormuloj kaj eĉ menskonfuzuloj. Sed kie estas la limo inter la krimulo kaj la honestulo, inter la frenezulo kaj la prudentulo, inter la normulo kaj la nenormulo ? Kie estas la ekzaktaj difinoj de la krimulo, frenezulo, nenormulo, kaj de la sana homo, kiu disponos pri la aliaj ? Kaj kiam oni scias, ke tiu libro estis verkita en 1935, tiuj "eŭtanaziaj establoj provizitaj per taŭgaj gasoj" bedaŭrinde ŝajnas al ni la inspirantoj de la naziaj koncentrejoj...

Se la leĝo agnoskas la ekzistadon de nenormaj estaĵoj kaj permesas ilian forpasigon je la naskiĝo, unu kroman paŝon oni povus facile fari ĝis la forpasigo dum la vivo de nenormuloj laŭ iuj difinoj... Tiu paŝo povus esti farita tiom pli facile, ke iuj medikamentoj kaj la atomaj

radioj respondecas pri granda nombro da nenormaj naskiĝoj kaj malsanoj, kiuj manifestiĝas longatempe post la naskiĝo ; oni do povus proponi al ni, kompense pro tiu fuŝado, la praktikon de eŭtanazio, kial ne ?

Ni neniam estos sufiĉe multnombraj por defendi kaj tenadi en la spirito de la homoj rigoran respekton al la vivo ; ne nur rifuzante al eŭtanazio la leĝan apogon, sed ankaŭ kontraŭbatalante ĉiujn sistemojn de detruado kaj difektiĝo de la vivo.

Tamen jes, estus dezirinde en iaj kazoj praktiki eŭtanazion pro simpla humaneco. Sed la simpla saĝeco ordonas ne ĝin enlasi en la leĝecon.

°°°

Ekzistas aliaj medicinaj praktikoj ne malpermesitaj, antaŭ kiuj ni malsereniĝas, se ni nur iom ilin pripensas. Iu el ili iel estas la malo de eŭtanazio ; ĝi konsistas en tio, ke oni provas je kia ajn kosto igi vivi estaĵon destinitan al morto ; oni ĝin trovas samkiel eŭtanazio ĉe la naskiĝo kaj ĉe la morto.

Iam infanoj naskiĝas en stato de ŝajna morto. Oni tiam praktikas revivigon, operacion kun varia daŭro. Fine, la infano nature ekspiras, ĝi estas savita ! almenaŭ laŭŝajne ; sed se la cerbo restis iom tro longatempe sen irigacio, la nerva sistemo estos nenormala kaj la infano estos trafita de mensaj perturboj aŭ de epilepsio, de plena aŭ parta blindeco...

Aŭ infano naskiĝas longe antaŭtempe ; ĝi estas grava frunaskito, oni ĝin bredas en inkubatoro ; sed la korpeto tro frue veninta sub la taglumon havis nesufiĉe formitajn nervajn ĉelojn por povi esti artefare elfinita, kaj iun tagon oni anoncas al la patrino, ke la infano vivos sed li estos blinda kaj idiota. Ĉu oni ne povis lasi la naturon agi ?

Oni diros, ke oni devas fari la eksperimenton, ĉar ĝi iafoje sukcesas, kaj iam ĝi tutcerte sukcesos. Sed kial tiu kompatinda paketo el homa karno devas servi kiel kobajo kaj pagi per mizera vivo fiaskan eksperimenton ? Ĉu vere la homo rajtas tiri estaĵon el duonnenieco, se li ne estas tute certa fari el li homon, kiu havos la samajn ŝancojn kiel la aliaj esti sana kaj normala ? Antaŭ la fiasko de tia provo, ĉu eŭtanazio ne havus tiam la formon de riparo ?



Rilate la metodojn, kiuj praktikiĝas ĉesojle de la morto, mi ne insistos pri la plej kutimaj de ĉiuj konataj : esploroj, radiografiaĵoj, serumoj, transfuzoj, ktp... aŭ eĉ mortosojlaj operacioj, kiuj nur prokrastas la fatalan horon sen mildigi la suferon de la malsanulo, kaj estas iafoje diskutindaj.

Sed mi volus paroli pri fakto, kiu eble ankoraŭ ne estas tre konata, kiun mi ekscius nur antaŭ kelka tempo pere de artikolo de D-ro P.B. en "Humanismo" n°54 de Nov-Dec.1965. Jen ĉi-poste la esenca parto :

> "Juna homo sanoplena memdezire subiĝas al eta estetika operacio. La riskoj estas tre etaj, praktike nulaj antaŭ ĉies okuloj. Tamen ĉe la operacifino, sen tio ke oni povis ĝin konjekti, lia koro abrupte haltas.
> Ĉu li estas mortinta ? Povas esti. Certe, se oni forlasus lin. Sed li estas en la kiel eble plej bonaj teknikaj kondiĉoj por ke oni ĉion provu. La tuta kirurgia skipo klopodas ĉirkaŭ li kaj neniu rimedo de la terapio kaj de la plej moderna tekniko de revivigo estas neglektata. Post tempo nedifinita sed kiu povas ŝajni mallonga, ĉirkaŭ du ĝis tri minutoj, lia koro denove ekbatas kaj denove en liaj angioj cirkulas la sango. Tute evidente tiu organismo revivas. Ĉu tiu estaĵo estas denove vivanta ? Jes, se oni konsideras nur la senteblajn aspektojn. Sed, oni tion volu aŭ ne, la problemo ne estas tiel simpla.
> Ni vidu la sekvon. En la horoj, la tagoj sekvantaj ĉio ŝajnas iri plejeble bone. En tiu organismo, la koro, la renoj, la pulmoj, unuvorte ĉiuj esencaj organoj bone funkcias. Mi distingas organojn de organismo. Ĉu necese endas konkludi el unuj, pri la stato de la alia ? Ĉio estas en tio ĉi, ĉar ĉio bone funkcias, ĉio escepte de <u>la CERBO</u>.
> Tiu ĉi estas morta. Organo la plej fragila el ĉiuj tial, ke ĝi estas la plej alte diferencigita,

ĝi ne rezistis pli ol kelkajn sekundojn al senigo je sango, do je oksigeno. Profunda komato ; plu neniu signo de konscio ; plu neniu skizo de percepto kaj ankoraŭ malpli de penso ; plena foresto de respondo al iaj ajn sensaj stimuliloj ; unuvorte ABSOLUTA SILENTO. Kaj por certigi la tuton, la decidiga testo pri foresto de ĉia cerba aktiveco evidentigita de la malapero de la elektraj ondoj sur elektro-encefalografia strekaĵo, kiu fariĝas "dezerteca".
Nu, estaĵo absolute vegeta, planto kies vivo pludaŭras nur dank'al tute artifika lukso de teknikaj rimedoj kaj konstantaj zorgoj de specialistaj skipoj, kiuj senhalte alterne laboras por kontroli la bonan funkciadon de ĉiumomente necesa kompleksa aparataro : ŝtala pulmo, arta spirilo, artaj renoj, ktp...
Kaj la problemo kuŝas en tio : tiu nekonscia estaĵo, sen ebleco de rilato kaj - por ni kiuj ĝin observas - sen konscio, ĉu ĝi vivas ?
Ĝia aŭtonomio estas nula. Se tiuj zorgoj haltas nur kelkajn momentojn, la vera morto sekvos la ŝajnan vivon, kiun ili solaj povas krei kaj pluteni."

D-ro P.B. poste elvokas ĉiujn problemojn starigitajn de tiu kazo : problemon juran, problemojn moralajn, sociajn kaj financajn kaj eĉ la kazon de familioj kiuj "postulos laŭ siaj personaj inklinoj kaj iafoje siaj plej hontindaj interesoj" la pluvivon aŭ definitivan morton de siaj parencoj. Tamen...
"Neniu dilemo por la kuracisto. Eĉ plene informita de la kompleta foresto de espero en tiaj kazoj, li ekzistas por kuraci, ne por mortigi.
Sed se la problemo ŝajnas simpla, kion diri pri la dilemo de lia morala konscienco se aliaj malsanuloj pli teknike refortigeblaj bezonus tiujn zorgojn aŭ aparatojn ? Kiun kondamni ? Tiun preskaŭ morta, aŭ tiun kiu povas pli bone pluvivi ? Kie finiĝas la vivo kaj kie komenciĝas la morto ? Kie komenciĝas la akceptebla limo de la devo kuraci ? Ĉu ankoraŭ temas pri organismo, pri vivanta estaĵo en la reala senco de tiu termino, aŭ simple pri arta kulturo, pri pluvivo de organoj pli-malpli izolitaj ? Kaj en tiu ĉi kazo, kiu kuraĝos alpreni la timindan respondecon "ĉesigi la elspezojn"? "



Kaj pli sube :
"Kiu estas la kuracorganismo, kiu estas la privata aŭ publika asekuro, kiuj akceptos garantii aŭ repagi tian riskon kaj tiel tenadi pluvivon de resaniĝo eĉ eta ?
....
Jam de la momento kiam ni havas la rimedojn pluvivigi artifike kaj senespere, ja endos, ke iu alprenu aŭ la decidon pri pluvivo, aŭ la decidon pri morto, kiu estos la ĉesigo de la specialaj zorgoj."
Ankoraŭ pli sube :
"Nia esenca rolo kaj nia misio laŭ la senco la plej alta estas eviti la morton kiel eble plej longe, ne ĝin prodigi. Aliaj "ekzekutantoj" estos trovendaj - ne facila afero. Estas en tio netuŝebla principo, kaj la problemo ja devos vojiri ĝis la spirito de la leĝodonanto."

D-ro P.B. ne estas la sola kuracisto, kiu starigas tiujn demandojn, kaj la jam citita enketo de Barrère kaj Lalou mencias la deklaron de kuracista paro laboranta en sekcio de revivigo :

"Ni flegas prokrastitajn malsanulojn, mortvivantojn, kies koro ankoraŭ batas, sed kies cerbo ne plu funkcias. Ili spiras nur dank'al kompleksa maŝino, kiu kostas fortuneton kaj kies nombro en la hospitalo estas eta. En urĝa kazo, ekzemple epidemio de poliomjelito, tiuj samaj maŝinoj povos doni al aliaj malsanulojn preskaŭ kompletan resaniĝon, almenaŭ vivon realan, konscian kaj plenan. Ni do troviĝas antaŭ terura demando : "Kiom da tempo ni devas lasi pluvivi tiajn sencerbajn estaĵojn apenaŭ homecajn, dum ili paralizas sekcion, blokas specialigitan personaron kaj konfiskas aparataron, kiu povus savi aliajn homajn vivojn ?"

Nu! ŝajnas al mi, ke tio estas falsa problemo. Ni scias, ke la morto estas iel iompostioma, ke la tuta organismo ne mortas en la sama momento, kaj ankaŭ ke la morto povas esti nur ŝajna. Sed kiam la cerbo, sidejo de la pensado kaj konscio, estas senrimede morta, kiel, pro kiu aberacio oni povas ankoraŭ konsideri vivanta estaĵo senaniman korpon, en kiu efektiviĝas nur iuj movoj sole nur dank'al komplika mekaniko ? Mi kon-

fesas, ke tiu imagbildo estigas en mi nesupervenkeblan mallogon ; tio ĉi ŝajnas al mi indigniga kaj malsaniga, kaj mi demandas min ĉu la spiritoj la plej kleraj ne ricevus avantaĝon sin inspirante iam kaj iam el la simpla prudento de la ordinaraj homoj. Ĉu la kuracisto iafoje ne fariĝas speco de sorĉisto, ĉe kiu respekto al la vivo estas plu nur fiksa ideo, kaj kiu, konfuzita de siaj pli kaj pli grandaj povoj, ne plu vidas la limojn trans kiuj estas maldece manipuli la homan korpon.

Kaj fakte laŭlonge de sia artikolo D-ro P.B. baraktas inter du certaĵoj : la cerbo estas morta, do la homo ne vere vivas ; unua certaĵo tuj forgesita por tiu alia : mi devas pluteni la vivon. Senkuraĝigite, li petas la leĝofaranton fiksi la precizan momenton, kiam la pluvivanta korpo devas esti konsiderata kiel mortinta. Ĉu tio ĉi ne ĝuste estas la tasko de la kuracisto, kaj de neniu alia ? Ĉu ne li devas trudi al la leĝofaranto la decidon : li ne lasos morti, profite al morta kaj mekanikigita korpo, malsanulon, kiu povus esti reale savita.

Oni eble kontraŭdiros, ke iam oni sukcesos reale revivigi tiun korpon konsideratan nemorta. Sed de ĉiam la medicino kutimas fari esplorojn kaj eksperimenti super kadavroj. Pluvivigi korpon estas novspeca eksperimento, sed kiu ĝis nun estas konsiderebla nur kiel eksperimento super korpo senigita je la vivo. Nur kiam mortinto, cerbo reale revivos, stariĝos novaj demandoj, determinendaj estos la novaj limoj de vivo kaj morto. Atendante tiun tagon, ni provu resti prudentaj, kaj ni memoru ke ankaŭ la morto devas esti digna kaj rajtas nian respekton.

°°°

Povas ŝajni bagatelo persiste defendi la dignon de vivo kaj morto, protekti endetale nombron relative etan da homaj vivoj, kiam aliflanke milionoj da vivoj estas senkonsidere forigitaj en la koncentrejoj, en la militoj kiuj konstante damaĝas nian planedon, kaj kiam la nukleaj eksplodoj endanĝerigas ne nur la vivon de individuoj, sed ankaŭ la vivon de la specio, la vivon animalan kaj vegetalan, tiel fariĝante sinonimo de "integrala detruo de ĉia vivo". Sed la fakto ke, spite la detruivan frenezon de niaj socioj, ekzistas homoj kiuj obstinege serĉas solvojn pri problemoj rilatantaj al la vivo, devas nin



kuraĝigi kaj helpi ne komplete malesperi pri la homaro.

°°°

1982 - 16 jarojn post verkado de la ĉi-supra teksto, mi povus aldoni multon ! Mi diru nur jene :

- Kiam la t.n. "terapia obstinego" fariĝas ĉiutaga praktiko ;
- Kiam kuracistoj en la hospitaloj utiligas la malsanulojn kaj precipe la senhelpajn maljunulojn kiel kobajojn ;
- Kiam P-ro Schwartzenberg praktikas eŭtanazion malkaŝe kaj senpune (mi ne diras devige malprave) sed kontraŭbatalas la simplajn doktorojn, kiuj proponas kontraŭkancerajn rimedojn malpli danĝerajn kaj suferigajn ol la "oficialaj" (afero Solomidès kaj aliaj) ;


ni ne postulu, ke eŭtanazio fariĝu laŭleĝa, kio ankoraŭ pligravigus, kion oni hodiaŭ nomas "la medicina povo".

Denise Castelló.

---

Por franclingvanoj (el letero de Jakelino) :

En la maja n-ro de la revuo "Autrement" (1982) jena informo : Suicide mode d'emploi (kiel sin mortigi) "La instinkto de konservado estas aĉaĵo" diris desegnisto Chaval. Fortaj per tiu koncepto Claude Guillou kaj Yves Le Bonniec publikigas "Suicide mode d'emploi". La verko estas konstruita kiel studo pri fundamenta kaj historia memmortigo, ĝiaj malfacilaĵoj kun moralo kaj justico, ĝiaj renkontoj kun la nazia ŝtato, sekvita de parto tre dokumentita kaj titolita "Eléments pour un guide du suicide" (elementoj por gvidlibro pri memmortigo). Tiu ĉapitro ilustras la teknikojn malplej sovaĝajn kaj plej certajn, precizigante la dozon, kiel jam menciis tiu verko "Techniques du suicide" (teknikoj de memmortigo) publikigita en 1901 de franca anarkisto Paul Robin, mem mortiginta sin en 1912.
Suicide Mode d'emploi, histoire, technique, actualité Editions Alain Moreau. Noto: ŝajne neniu leĝo malpermesis la publikigon de tiu informeto en Autrement nek la publikigon de la du libroj menciitaj en ĝi.
(Informo konigata de salajratino de la ministerio pri kulturo!!)








# VORTOJ DE MALJUNULO

valo

En mia tempo...

En la tempo de mia infaneco, mi fariĝis esperantisto. Kaj esperanto. Mi esperis, ke la nova sento, kiu venis en la mondon, alportos sanktan harmonion kaj eternan pacon ; kaj ke la popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian.

La du lastaj militoj - en Maroko kaj en Balkanoj - estis finiĝintaj, kaj la homoj vivis en paco en la tuta mondo.


Unu jaron poste eksplodis la unua mondmilito. Kvarjara terurego. Dudek kvin jarojn poste, la dua. Kvinjara terurego. Inter la du, kaj poste, ĝis nun inkluzive, neniam silentis la armiloj. En iu aŭ alia parto de la mondo, plejofte en pluraj samtempe, furiozas bataloj. Ĉiuj regnoj (krom unu °) freneze sin armadas. Eĉ tiuj, kiuj ne kapablas sufiĉe nutri sian popolon, elspezas sumegojn por tiu stultega celo. Kaj ni ĉiuj vivas sub la minaco de tria pli gigante terurega konflikto kaj de nuklea apokalipso.

Ĉu iam la homaro resaniĝos el sia demenco ? Ĉu iam falos la obstinaj baroj inter la popoloj dividitaj ? Ĉu iam la tero fariĝos sennacia ? Ĉu iam niaj pranepoj estos malpli frenezaj ol ni, ĉu ili fine fariĝos saĝaj?

-------

°) Kostariko.

La verkaro de VALO ĉe SAT-Broŝurservo : "El la kara infaneco", "Kontraŭflue", "Sepdek jaroj sub la verda stelo", "Migrante tra metioj", "Pri la E-literaturo". Speciala oferto por la tuto : 30 FF kun afranko.



# ĉies voĉo

## E Ŭ R O P O   E N   D A N Ĝ E R O

Al la koro de Eŭropo jam celas pistolo de Sovetio sub formo de 200 SS20, kiuj kapablas movi sescent (600) raketojn kun ĉiu po 3 nukleaj ogivoj de ĉiu 150 kT de TNT-eksplodpovo. Tiu armilaro ebligas neniigi 1800 celitaĵojn troviĝantajn je disto de 4000 km kun celprecizo de malpli ol 150 m. Plie, tiuj SS20 bezonas nur horduonon por esti reŝargitaj, kaj ili estas moveblaj. Ĉiu punkto en Franclando, pere de tiu terura armilo estas atingebla kun tiu precizeco de 150 m elde trans la Ural-montaro ; kaj sufiĉas scii ke, en la okcidenta mondo, sufiĉas jam, ke 400 gravaj militaj celitaĵoj estos atingitaj por neniigi ĉian militan defendon : kun tia precizeco, la atako povus resti pure "milita", t.e. konsiderata kiel taktika aŭ "konvencia", kio almenaŭ teorie, laŭ la laŭgrada defendo-teorio, permesus nur pure militan defendon (jam neeblan). Restus tamen la malhumanaj reprezalioj de la francaj kaj anglaj submaraj atomŝipoj kontraŭ sovetiaj urboj. Ĉu registaro, aŭ pli precize ŝtatestro, tion decidus, sciante ke tiu "strategia" rebato kontraŭ la soveta popolo mem, eĉ ne ŝanĝus la finan rezulton pro la jam armea kolapso ? Ĉiukaze, ses mil sovetaj kirasĉaroj ekmarŝos, renkontante nenian reziston kaj invados okcidentan Eŭropon same facile kiel jam okazis en Berlino, en Budapesto, en Prago.

La sekvan tagon, en ĉiu okcidenta ŝtato, leviĝos popola registaro, kiu je la nomo de la uzinlaboristoj kaj de la malriĉaj kamparlaboristoj de ties ŝtato, dankos al la afabla kaj sindona helpo de la soveta armeo kaj popolo, por establi pliajn popolajn demokratajn respublikojn, kaj sekve tiajn idealajn sociojn, ke multaj ĝis nun nesolveblaj problemoj memsolviĝos.

Oni ne plu bezonos striki ; la uzinoj estos ja fariĝintaj propraĵo de la popolo ; por la bono de tiu popolo, oni celos nur plej multe produkti per la plej malgranda salajro. Oni ne plu aspiros al eksterlando se ne social-



isma, ĉar estante en popola paradizo, oni nur pensu, ke, laŭdire, antaŭ tretre longe oni perdis paradizon, ke sufiĉas unu fojo, ke nun ne plu!... Definitive finiĝos tiu grandega skandalo de la superproduktado, de tiuj forĵetitaj pomoj, de tiu troo de lakto kaj butero, kies superplenon oni brokante liveris precize al Sovetio ; tiu ne plu scios de kiu aĉeti : granda plia ofero de tiu frata nacio ; de troa abundo de aŭtomobiloj kaj de rezulta trafikasfiksio. La problemo de la internacia komunikado estos mirinde simple solvita : kiel en ĉiuj orienteŭropaj landoj, la rusa fariĝos deviga studobjekto. Cetere, la popolo ĝuos grandan disvolviĝon de la eduka sistemo cele al prononco-reedukado de la plenkreskuloj : jam de longe oni rimarkis, ke la orienta kaj okcidenta prononcoj diverĝas por vortoj kiel "libereco, ekspluatado, demokratio, reedukado, psikiatrio", ktp. Ĉi-cele pro malsufiĉo de lernejaj konstruaĵoj oni aranĝos vastegajn eduko-kampojn por eŭfoniaj prononcekzercoj, t.e. la jam famaj "GURUAJ LABORATORIOJ por GORĜPLEZUROJ", mallonge "GULAGOJ".

Kial Sovetio ne atakas ? Verŝajne pro timo pri la strategiaj reprezalioj, ankaŭ pro la usona ŝirmo. Sovetio fakte ne deziras militon, ĝi volas nur venkon kaj superregadon, tio estas malmistero : ĉiuj sovetiaj estroj ekde Lenino proklamis tion. Sed la celon atingi prefere sen milito. Pro tio, ĝi silente minacas kaj fidas al la daŭro, por ke tiu angoriga situacio rezultigu subfoson de la morala rezisto de la okcidentaj popoloj, kiuj povus fali kiel maturaj fruktoj. Kun helpo de "pacamaj" ligoj, kiuj nepre ignoras la ekzistantajn sovetajn SS20 kaj organizas NUR EN OKCIDENTO porpacajn procesiojn kontraŭ la ankoraŭ ne konstruitajn kaj ne dismetitajn usonajn Perŝingojn. Homoj multnombraj blinde, kvazaŭ sonĝe sekvas la sovetajn tromplogilojn, nevidante ke ilia agado glitas al perdo de la libereco. Tiu sinteno estas rekta kuraĝiga allogo al ruĝa atako : ĝi pligrandigas la riskon, ĉar povas kredigi al "matureco de la frukto".

La bildo ne estas alloga : ĝi timigas kaj tremigas multajn homojn, kiuj pensas antaŭ ebla milito : "better red than dead", "besser rot als todt" - "pli bone ruĝa ol buĉa" ; sed la vera alternativo estas "ĉu <u>certe</u>

sklava aŭ eble morta" ; alivorte, ĉu sklava aŭ brava ? Tio estas tre malagrabla kaj danĝera travivaĵo, kiu necesigas vekiĝon de la okcidentanoj, konsciiĝon de la vera valoro de la perdeblaĵoj, pri la nuna nesekureco, kaj por firma decidopreno. Neniel utilas negi la nunan danĝeron kaj neceson ĝin alfronti, kiom malagrabla kaj malkomforta tio estu. BOSSUET (Bosŭe) prave diris, kvazaŭ li antaŭvidus niajn pacamajn memiluziiĝantojn : "La plej aĉa spirittordo estas kredi, ke la aferoj estas tiaj, kiaj oni deziras, ke ili estu."

MANCEAU.

---

R E S P O N D E A L

GISELLA MARCHIONI ( L! n°43, p.26)

Pri -UK-

Bravon pro la eltirkestigo de -UK- el PAG ! mi subtenas! (almenaŭ la sufikson, se eventuale ne la agon!...) Kompreneble pri kastrado "EKS" tute ne taŭgas kaj mankas afikso por tiu kazo. Tamen se UK ne prosperas, oni povas provi UMIGI la bestojn (BOVUMO, ŜAFUMO...). Sed mi ja preferas la pli teknikan UK, kiu permesas fari el besto sekse difinita, beston fine neŭtran. Ekzemple, la Esperanto U.K. (ĉijare en Belgio) klare indikas, insiste, kvazaŭ pleonasme, ke en tiu okazo Esperanto ja estas neŭtre neŭtrala...

Pri -UĈ-

Mil diabloj! De kio devenas tiu U de UĈ ? Ĉu de UK ? (mi tremas!). Kial ne konservi la simetrion IN/NJ per IĈ/ĈJ ? (kiel mi jam proponis en inta Laŭte!) La I de IN kaj IĈ signus la difinitecon rilate sekson, kaj oni lasu U (en UK, UL) por signi aferojn eksterajn al la seksa determinado.
Cetere la U- kaj I-sufiksojn kombiniĝas diversmaniere: ULIĈO/ULINO (Belulino Beluliĉo - sed kial ne Belino Beliĉo) - INUKO/IĈUKO (Boviĉuko, katinuko se necese!) - INIĈO/IĈINO (en zootekniko ne temas pri la sama kazo!)

Pri GE - La enkonduko de IĈ (aŭ UĈ laŭ Gisella) laŭ mi grandparte arkaikigas "GE". Ĝi jam pli kaj pli maloftas, kaj povas utili nur kiel insistilo : gebovoj preskaŭ ne necesas.

Pri RI - en la signifo de LI aŭ ŜI.

Tiupunkte, mi preferas la proponon de Michel Challulau el Marsejlo : ĴI - la ĉefa argumento estas, ke ĴI similas al ĜI, kies aparta uzo ĝi fakte estas (aŭ devus esti). Pro simileco "ĴI" do estas facile enkondukebla : eĉ se oni neniam aŭdis pri "ĴI" oni tuj povas diveni ; eventuale oni povas opinii, ke temas pri preseraro (ĴI anstat' ĜI) kio ne gravus, pro la laŭgramatika praveco de "ĝi" en la konsiderata kazo. (alian argumenton donas M.C. : Ĵ estas same longa kiel L de LI kaj same ĉapelita kiel Ŝ de ŜI - Frandu la argumenton !)
Sed kial ne ŜLI ?
Ja nia epoko vivas floradon pri proponoj rilate la triapersonajn pronomojn (IŜI ; RI, JI, ŜLI...) kaj samtempe oni lasas en la ombro tiun povran "CI". Se oni povas karese alvoki iun per ĈJ/NJ oni ja ne povas same agi per pronomoj. Aĥ ve !
Mi konsentas, ke tiu "ci" malfacile estas elparolebla (mi difektis al mi du incizivojn provante diri trifoje sinsekve "ci scias") tamen mi ŝatus ilon pli mildan ol la neŭtran "vi" por miaj ĉj/nj-rilatoj...(eble TI ?)

H. ELIK.

---

PRI "UKAĴOJ" APERINTAJ EN LA N-RO 43

Jes, bonega la "uk"-solvo por la kastritaj bestoj aŭ homoj. Oni rajtas do uzi "Fideluko"n anstataŭ "Fidel' Kastro". Vere tre sprita afero... kaj mi tutkore konsentas al ĝi. Tamen mi konsideras tre danĝera la sufikson "UĈ" por anstataŭigi la prefikson "VIR". Jes, tre danĝera por Esperanto, kies fizionomio estas tute ŝanĝata tiagrade, ke oni ne plu rekonus Esperant-ukon (Esperan tukon).

Kompreneble, mi ne kritikas la nemenciitan devenon de "UĈ", tiel sprita ĝi estas. Kaj Gisella parolante pri "uĉilo" (popola nomo itallingva de la penisa Triunueco) donas al ĉiu, kiu scipovas la italan, la ŝlosilon de la

afero. Tamen, ankaŭ la aliaj Esperantistoj estas indaj je klarigo ne tabua. Do "uĉ" devenas de la ideo "uĉila", kaj tio de la itala vorto "uĉelo", kies signifo estas "birdeto" (en la nuna kunteksto). Ĉar la geitaloj tiel slange nomas la etan seksaĵon virecan, kiom da inko por tiel malgranda afero ! Sed la Nord-italoj, kiuj estas tre gaŭlecaj pro historiaj kaŭzoj (mi tre bone konas la aferon, kiel Venezi-ano), kelkfoje blasfemas je "Krista uĉ-ilo".

Bedaŭrinde la "moderna" vivo, pere de la veneno de la amasinformiloj, malaperigas pli kaj pli tiajn belajn lingv-aĵojn kamparajn. Eĉ en Francio, la fama ĵusmortinta kant-isto Georges Brassens (ĝorĝ' brasens') bedaŭris tiun mal-aperon de gaŭlecaĵoj el la franca. Oni anstataŭigas ilin per sensukaj angldevenaj esprimaĵoj !

Kiel uk-igi la francan gramatikon

Eble tio, kion mi tie ĉi skribos, donus al E-istoj, ideon por solvi nian gravan aferon pri in-vireco aŭ vir-ineco esperantista.

Nu, ĉar mi estas (fem)-inista viro, mi malkovris rime-don por igi akceptinda la franclingvan gramatikon, sen ŝanĝi ĝin :

Dum ĉiu libro diras, rilate al agordo de adjektivo kun pluraj nomoj "vireco superas inecon", mi diras tutsimple : "ĉar la viroj estas esence pigruloj, oni uzas virecon por gramatike labori kiel neŭtra ĝenro!". Tamen, bonvolu ne forgesi la fakton, ke kelkfoje ineca ĝenro laboras neŭtra-le. Tiel la vorto "persono" estas ineca, laŭ la franca gramatiko. Ĉu franca fratino aŭ germana frato por mia veturilo ?

Kiel konkludo :

Kvankam mi estas tre pacema, mi deziras "UK"-igi ĉiun, viron aŭ virinon, kiu emus naskigi novan mortnaskitan Idon al nia kara Esperanto.

Lorenso Tomesoli.

---

El intertempe ricevita letero de Gisella MARCHIONI :

"...mi elkore dankas vin pro la numeroj de Laŭte (°)kiujn vi sendis al mi. Ili pruvas, ke ne nur mi fiaras seksismon

(°)kie troviĝis artikoloj pri la ĉi-supre aludita temo (red)



en la zamenhofa esperanto ! Samideano ELIK eĉ "elfosis" la nenaskitan sufikson sekvinte la saman logikan vojon, kaj VALO pensas, ĝuste kiel mi, ke la ĉefa kaŭzo de la Zamenhofa faluskrateco estas la neceso traduki la Gene-zon.

Se Zamenhof estus naskinta la sufikson "UĈ" (iĉ, oĉ, aĉ, eĉ ne taŭgas ĉar jam uzataj, la dua litero devas esti ĉ...), tiel simplan kaj oportunan, oni legus en la Biblio :

"Kaj Li nomis ŝin virino, ĉar de viruĉo ŝi estis deven-igita"... aŭ similan frazon, evidente absurdan kiel la ideo mem. (....)

N.B. Mi sendas al vi la (neperfektan!) tradukon de la poemeto de HUGO "Autre chanson" por montri, ke en espe-ranto ne estas bezonata nova plurala person-pronomo :(°)

| | |
|---|---|
| Comment, disaient-ils,<br>avec nos nacelles<br>fuir les alguazils?<br>Ramez, disaient-elles. | Kiel, liuj diris,<br>per etaj ŝalupoj<br>fuĝi de policlupoj?<br>Remu, ŝiuj diris. |
| Comment, disaient-ils,<br>oublier querelles,<br>dangers et périls ?<br>Dormez, disaient-elles. | Kiel, liuj diris,<br>forgesi kverelojn,<br>malpacojn, danĝerojn?<br>Dormu, ŝiuj diris. |
| Comment, disaient-ils,<br>enchanter les belles<br>sans philtres subtils?<br>Aimez, disaient-elles. | Kiel, liuj diris,<br>logi in-belaĵojn<br>sen sorĉaj filtraĵoj?<br>Amu, ŝiuj diris. |

(°) sed ja oni povus uzi la belsonajn montrajn pronomojn, de kiuj la pronomoj personaj devenas :

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| latine | ILLE | ILLA | ILLI/ILLAE | |
| esp. | LI | (ŜI) | ILI | |
| | LI(U) | (ŜI(U)) | LIUJ | ŜIUJ |
| | TIU | | TIUJ | |

---

El letero : "Tre bona ideo de Kurt SCHUT (Laŭte 43 p.28). Mi lernas mem E-on nur de la lasta jaro. La konsiloj kaj la maniero por progresi en la lernado, praktikitaj de la spertuloj de Laŭte estus bonvenaj" Jean CALAMY

E-aŭtodidaktoj, diskonigu via(j)n sekreto(j)n! (Red.)

**la kastelnova grupo**

H.ELIK S.SIRE






# letero el Israelo

Maagan, la 17-an de julio 1982

Karaj Samideanoj !

Depost la komenco de la libana militiro pluraj eksterlandaj samideanoj turnis sin al mi letere, petante laŭeble objektivan interpreton de la okazaĵoj. Ĉar respondi al ĉiu aparte estas ekster mia povo, mi decidis verki komunan leteron por ĉiuj miaj plum-amikoj.

Estas superflue prezenti mian identec-karton, vi ja konas miajn porpacajn konceptojn, mian malŝaton al perforto kaj brutaleco. Pro tio mi decide rezervas min de la nuna milito, precipe depost ĝia plivastiĝo ĝis Bejrut. Jam Ben-Gurion diris, ke paco estas preferinda eĉ al venka milito. Tiu ja kunportas homoferojn, mortintojn kaj kriplulojn por la tuta vivo, ruinojn, sangon kaj larmojn.

Aliflanke, mi volas esprimi mian indigniĝon pro la malica kaj ofte senbrida atako fare de la eksterlanda gazetaro kontraŭ Israelo, kiel ekskluziva kulpanto pro tiu milito. Laŭ iuj onidiroj, sovaĝa, neprovokita atako estis lanĉita kontraŭ la "senkulpa" PLO. Tiaj asertoj enhavas ne malmulte da hipokriteco. Kie forrestis la protestoj, kiam dum longaj jaroj vere senkulpaj civitanoj estis murditaj en senĉesaj ondoj de teroragoj fare de tiuj, kiuj arogas al si la titolon de liberec-batalantoj ?

Por vidi la realon en la ĝusta perspektivo, oni ne povas preteratenti jenajn faktojn : PLO establis en parto de Libano "ŝtaton interne de ŝtato", transformante ĝin en centron de internacia teror-bazo. Tie estis planitaj kaj organizitaj agres-agoj kontraŭ Israelo, kontraŭ judaj institucioj kaj individuoj tutmonde ; tie estis trejnitaj ankaŭ, helpe de libiaj petro-dolaroj, la plej danĝeraj elementoj de la homa socio, kiel italaj "Ruĝbrigadanoj" aŭ germanoj el la bando "Baader-Meinhof". PLO malamigis sin al la loka loĝantaro pro sia malhoma konduto : rabado, seksperfortoj, elpelo de loĝantoj el iliaj propraj hejmoj, buĉado de ostaĝoj eĉ el sia propra gento. Ili amasigis kolosan kvanton da armiloj kaj municio, kiu nun estas transportata en Israelon, kaj tiu laboro, ses semajnojn depost la komenco de la militagoj, ankoraŭ ne finiĝis. Ĉu povas ekesti dubo pri la destino

de tiuj arsenaloj ?

La eksterlandaj televid-stacioj montris apokalipsan bildon pri la ruinoj en la libanaj urboj ; ili nur "forgesis" mencii, ke tio grandparte ŝuldiĝas al la civitana milito daŭranta jam sep jarojn, dum kiu preskaŭ cent miloj da homoj perdis sian vivon, aliaj centmiloj fariĝis senhejmaj aŭ devis formigri.

Notindas ankaŭ, ke niaj defendarmeanoj estis bonvenigitaj kaj akceptataj kiel liberigantoj fare de la granda plimulto de la libananoj, ne nur de kristanoj, kiuj plej multe suferis, sed ankaŭ de druzoj kaj ŝijaistoj. Kelkaj nur riproĉis al niaj soldatoj la tre malfruan alvenon... Tamen la plej entuziasmaj Israel-amikoj estas la adeptoj de la organizo "Gardistoj de la cedroj". Laŭ sia aserto, la libananoj konsistigas apartan genton ; ili rigardas sin rektaj idoj de la antikvaj Fenicoj, tre parencaj al la hebreoj. Ili strebas disiĝi de la arabaj kulturo, lingvo kaj skribo, de ekstere altruditaj al ili. De ilia parto aŭdiĝas la plej forta instigo likvidi la armean forton de PLO ("frakasi la kapon de la venena serpento") por liberigi la libanan popolon de la longdaŭra koŝmaro. La cetera mondo forlasis nin, ili diras, sed feliĉe Israelo venis por helpi nin liberiĝi de tiuj nedeziritaj gastoj, kiuj misuzas la gastorajton.

Oni do devas ankaŭ ne prisilenti la grandaniman kaj korektan konduton de niaj soldatoj al la civiluloj. Ofte ili riskis sian vivon pro la zorgo ne damaĝi senkulpajn civitanojn, inter kiuj kaŝiĝis la teroristoj. Diversaj israelaj help-organizoj disdonis malavaran materian helpon al la suferantaj libananoj. Multaj vunditoj estis helikoptere transportitaj por flegado en israelaj malsanulejoj, kie ili ricevas la samnivelan prizorgadon kiel niaj soldatoj, sendepende de tio, ĉu ili apartenas aŭ ne al PLO aŭ al la siria armeo. Estu tute klare, ke Israelo havas neniajn teritoriajn postulojn de Libano. Tuj kiam la Defendarmeo estos atinginta sian celon, ĝi retiriĝos el libana teritorio, sed ties nepra kondiĉo estas la retiriĝo de la aliaj fremdaj armeoj, la siria kaj PLO. (Cetere, la sirianoj penetris siatempe por helpi la kristanojn kontraŭ PLO kaj ties aliancanoj, sed baldaŭ ili ŝanĝis la taktikon, kaj stariĝis ĉe la alia flanko de la barikado). Forigo de la fremdaj armeoj kaj starigo de firma koalicia registaro kongruas ankaŭ kun la volo de la libana popolo mem. Post tio maturiĝos la kondiĉoj por starigo de paco kaj amikaj rilatoj inter la du najbaraj kaj multe suferintaj popoloj, la libana kaj la israela.



Refoje emfazante mian nemiskompreneblan oponon al ĉiu ajn milito, mi petas prijuĝi, ĉu estas honeste ĵeti ekskluzive aŭ eĉ grandparte la akuzon sur la ŝultrojn de Israelo ? Mia respondo estas nea. Kion vi opinias ?

Fine estu permesite al mi citi la vortojn de Ivo Lapenna pri la paco : " ...Ni devas diri tute klare, ke ekzistas diversaj specoj de paco. Ekzistas paco kaj 'paco'. Ankaŭ arestitoj kaj kondamnitoj en karceroj estas tenataj en paco. Ni ne estas por tia paco! Ni estas por paco en libero, en kiu la homaj rajtoj estas observataj, ĉar nur tia paco respondas al la homa digno, kaj nur tia paco garantias personan feliĉon, materian prosperon kaj intelektan progreson."

Amike via, <u>Teddy Löwenkopf</u>, Israelo

## L E T E R O   E L   A R G E N T I N I O

"...La konflikto kun Anglujo finiĝis ; ĝi ne devus esti komencita. Ĝi estis agado de frenezuloj. Al la fronto estis senditaj junuloj, preskaŭ infanoj, 17-18-jaraĝaj, kun nur du aŭ tri monatoj da ekzercado. Laŭdire kelkaj soldatoj eĉ malsatis.

Laŭ mia vidpunkto Argentinio ne bezonas tiajn insulojn. Povas esti, ke, laŭ militistoj, ili havas aŭ havos grandan strategian valoron. Mi ne scias. Estas certe, ke historie kaj geografie ili apartenas al Argentinio, sed en la nuna situacio de granda sociala malkvieteco pro la grava ekonomia krizo, ne estis oportune komenci tian aventuron.

Argentinio havas milojn kaj milojn da kvadratkilometroj da produktema grundo tute virga, neniam surpaŝita de homoj, kaj grandegajn subterajn riĉaĵojn ne eltiritajn. Dume, miloj da laboristoj iras, reiras, vagas, serĉante laboron.

Ne estas oficialaj kalkuloj aŭ statistiko pri la kvanto da senlaboruloj kaj duonsenlaboruloj en nia lando, sed kelkaj opinias 1 500 000. La salajroj estas tre malaltaj kaj laboristoj aŭ oficistoj, kiuj laboras, serĉas ankaŭ alian laboron por plialtigi sian salajron por inde vivi. Tiel laborantaj uloj konkurencas kun senlaboruloj. Tio okazas ankaŭ pri emeritoj ĝuantaj bonan

sanon kaj kiuj laboras aŭ serĉas laboreton. Tio estas vera tragedio...

... Mi diris pli supre, ke estas granda sociala malkvieto, jes, sed ne estas sociala agitado, tute ne! Tiu ĉi malkvieto estas silenta, muta, kaŝe manifestata. Kial? De la regado de Peron kaj de ĝiaj fisindikatestroj la argentina laboristaro estis tute dresita, nur obeas, aŭskultas la mastran voĉon. Depost 1945 estas ĉiam la samaj fiuloj, kiuj bone amindumas kun ĉiuj registaroj, ĉu civila ĉu militista. Ili bone gardas siajn riĉaĵojn, sian luksan vivon, kaj la malbonaj nekapablaj registaroj, kiujn ni havas, ja tre necesas al ĉi kanajloj por trankviligi kian ajn laboristan ribeladon.

Nun estas promesita nacia balotado por 1984. Politikistoj kaj sindikatestroj per radio kaj televido multe fanfaronas kaj promesas indigi la vivon de la laboristaro, plialtigi la salajrojn... Argentinio estos la surtera paradizo de la laboristaro. Sed okazas, ke jam de 60 jaroj mi aŭdas la saman fabelon..." O.S.T.

''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''

__ANONCETO__ : Virina Movado per Esperanto serĉas Korespond-Dezirantojn

Ni, eldonantoj de la japanlingva __Sekso kaj Egaleco__, planas okazigi ĉi-aŭtune Esperanto-kurson por japanaj virinon, kiuj volus partopreni en per-Esperanta internacia virina agado. Ĉe la fino de la kurso, la kursaninoj komencos korespondi kun alilandaj virinoj en Esperanto pri virinaj problemoj.

Sendu al ni laŭeble antaŭ la fino de oktobro la nomojn kaj adresojn de korespond-dezirantoj, kune kun tiaj informoj kiel nacieco, aĝo, profesio, edzineco, nombro de infanoj, kapablo en Esperanto, ŝatataj temoj/opinioj, kaj dezirata tipo de japana korespondantino.

__Poŝtadreso__ : YAMAKAWA Setuko
1-3-4 Soka, Soka-si, Saitama-ken 340 JAPANIO

---------

La red. de "Laŭte!" tute speciale sin turnas al la legantinoj de nia bulteno, ke ili favore respondu tiun peton (cetere farita de unu el la abonantaro de "L!" en Japanio) pri afero jam abunde pritraktita en niaj paĝoj. Nura bedaŭro : ke la vira legantaro ne estas bonvena!

# Ĉies voĉo (daŭrigo)



## Respondo al Kamarado Yves PEYRAUT

Tiu, kiu demandas, rajtas kaj rajtigas pri respondo, sed la matematikistoj nur hontu pro sia silentemo, diris min Julo Ŝtrumpfo ekvekiĝinte. Do vi respondu al k-do Y.P., kiu petas ekzemplon pri ia koluzio anarkiismo-aristokratismo, ke ni ne konsideras anarkiismon el sama vidpunkto, kaj tiel ne povas alveni al samaj konstatoj kaj kon-statoj.

Mi konsideras ĝin de ekstere kun senpasieca objektiveco de observanto, kaj li de interne, kun subjektiveco fervora de partizano.

Por mi anarkio estas la normala natura ordo de la materio en konstanta evoluado, t.e. en senĉesaj malkomponiĝoj kaj rekomponiĝoj. Tiu evoluado okazas laŭ iu procezo ĉiam sama por ĉio kaj ĉiu, kaj en ĉiuj fakoj de la ekzistado, de luma stato al ŝtona, kaj de ŝtona al luma. La diversaj fazoj de tiu procezo analogas tiujn de la sunluma malkomponiĝo tra prismo aŭ tra la atmosfero dum pluvado kaj okazigas ĉielarkon aŭ luman spektron, t.e. ses kolorojn, al kiuj aldoniĝas la du koloroj de la lumstatoj mem : tage blanka, nokte nigra, entute ok fazoj, kvar por la malkomponiĝo - dinamika stato de blanka al verda koloro - kaj kvar por la rekomponiĝo - statika stato de flava al nigra.

En la socia kampo tiuj fazoj estas : liberala demokratismo, socialismo, komunismo kaj kolektivismo por la dinamika stato, kiu mem konsistigas la detruivan fazon de anarkiismo, kaj aristokratismo, teokratismo, teknokratismo kaj mastrata demokratismo por la statika stato, kiu mem konsistigas la rekonstruivan fazon de anarkiismo. Kaj ambaŭ fazoj okazas pro kaj sub la altaj gvidado kaj mastrado de la tutmonda kapitalistaro, instiganto, realiganto, zorga daŭriganto kaj profitanto de tiu proceza afero.

La unua eraro, laŭ mi, de la anarkiistoj estas kredi, ke, ĉar anarkio estas la eterna Ordo de la Naturo, ĝi, konsekvence, devas esti ankaŭ tiu de la homara socio.

Tiu ordo - ĝangalleĝo - konvenas nur al bestoj perfekte, korpe, sense kaj instinkte adaptitaj al ĝi. Sed por la homoj, mem anarkiistoj de la Naturo, ĝi ne taŭgas

pro iliaj kapablecoj konscii, superi kaj modifi la Naturon. Konklude : la anarkia stato de la Naturo ne konvenas al la anarkiistoj, bestoj degenerintaj de la animala regno entute - ne nur de la simia speco - al homa stato.

Ilia dua eraro estas kredi, ke ili estas komisiitaj por "efektivigi la historion" laŭ la diroj de Bismark iam raportitaj en S-ulo, kaj tial proklamas : "Nek dioj! Nek mastroj!" kaj mem sin faras dioj, die memdecidante pri la detruo de la ekzistanta sociordo kaj, tiucele, uzas ĉiajn eblajn rimedojn por detrui ĝin. Tiel agante, ili sukcesas nur pligravigi la akuŝdolorojn de Eva - la homa kolektivo.


Ilia tria eraro kuŝas en tio ke, ĉar nenia esto, ĉu materia, ĉu spirita, naskiĝas el nenio, sed ke ĉio fontas el io antaŭe ekzistanta, la moto en socio ne devas esti detrui por konstrui, sed konstrui ion novan antaŭ ol detrui la malnovan.

Ilia kvara eraro estas provi atingi al paca stato en homa socio per ekvilibrigo de la diversaj fortoj ĝin konsistigantaj. Kiel antaŭe dirite, la ekvilibra stato - ĝangalleĝo - necesiganta senĉesan mortigadon, ne taŭgas por la homoj, kiuj, pro siaj apartaj kapablecoj, kaj por la efektivigo de siaj konceptoj, sopiras al daŭra paca kunekzistado, kaj tial ribelas kontraŭ la anarkiecan staton de la Naturo. La nura rimedo al tiu paradoksa natura stato estas la harmoniigado de la interhomaj rilatoj, la difino unufoje por ĉiam de la rajtoj kaj devoj tiel de la kolektivo rilate la individuojn ĝin konsistigantajn, kiel de la individuoj rilate la kolektivon, komuna helpilo kaj vivmedio. Tion mi nomas socianismo aŭ "pli ol anarkiisma sociordo", ponto inter la anarkieca stato de la Naturo kaj la erariĝema homa anarkiismo. Ĝi ne estas kontraŭanarkiismo ; celas nek konvinki, nek propagandi, nek kolektive agadi. Ĝi celas nur montri al ĉiuj surteraj bonvolemuloj tion, kio vere estas "la Vojo klara, rekta kaj tre difinita" de Zamenhof.

Jen la tabelo, kiu plej koncize resumas la principojn de socianismo :

En venonta n-ro : La natura metodo en perkoresponda E-kurso, letera atestaĵo de dummilita interfratiĝo en 1914, ktp, kaj kompreneble, la kutimaj rubrikoj, i.a. la nova debato pri "Nacio". Ha jes, vere ne mankas verkemo ĉe la laŭtularo !






Unu lingvo

Oni komprenu ĝin tiel : Por alveni al daŭra harmoniigo de la homaj socirilatoj, nepre necesas, ke la homoj uzu saman lingvon - Esperantismo -, ke ili same konsciu pri la realeco kaj la homaro - Sennaciismo -, ke ili same memagadu en la socio - Socianismo - kaj ke ili celu al sama sociordo, difinota de la socianistoj, en kiu libereco ne estos sen interhelpo, egaleco sen solidareco - samsorteco -, kaj frateco sen konscio pri la tuthomara vivkonekseco : kamaradeco. Ĉar libereco sen interhelpo, ekzistkialo mem de la kolektivo, nur estas eraro kaj naskas malesperon ; ĉar egaleco sen samsorteco nur estas hipokrita vorto kaj naskas envion kaj malamon ; ĉar frateco sen vivkonekseco nur estas egoismo kaj naskas antagonismon.

Ĉiu memstaranto povas, sen timi pri eraro, mem apliki tiujn principojn en sia ĉiutaga vivado. Ĉar pro tiu alia naturleĝo, kiu montras, ke ĉiu kaj ĉio rezultas de la kuniĝo de du malaj elementoj, ĉiu aplikanto de tiuj principoj aŭtomate turnas la dorson al la malbona direkto, kaj mem batalas efektive por la Vero, la Paco kaj la Justeco.

La alternativo ĉiam ĉeestanta antaŭ la homaj individuoj estas tiu : Ĉu daŭre partopreni la procezon de sen-

ĉesaj malkomponiĝoj kaj rekomponiĝoj de la sociordo t.e. la sinsekvaj fazoj de la detrua kaj rekonstrua anarkiismo, kaj tial daŭrigi la akuŝdolorojn de Eva, la Homaro ? Ĉu individue apliki la principojn de socianismo en sia ĉiutaga vivo, kaj tial mem mildigi la homan sorton kaj prepari la sendolorajn akuŝojn de la estontaj generacioj ? Ĉiu mem pripensu, konkludu kaj elektu por si mem.

Cetere, kiu ajn estos la elekto, la Suno, Reĝo de la Ĉielo kaj Patro de la Ternatura anarkia stato pro sia konstanta radiada fluo, nek pli nek malpli brilados pro tio.

Nur la homoj povas mem mildigi sian sorton per iom da individua bonvolemo, krom tio estas nur vanaj blablabladoj kaj agadoj.

Tiel diris Julo Ŝtrumpfo kaj... ree dormis.

Resumita kaj raportita de

B.G.D (21758)

## ĈU VI KREDAS EN LA DEMOKRATIO ?

Dum preskaŭ 40 jaroj la hispana popolo sopiris por la atingo de la politika libereco. Mortis generalo Franco en 1975 kaj reĝo Juan Carlos instigis demokratian politikan sistemon. La rezignacianta hispana popolo, dum la indikitaj 40 jaroj, tediĝis, konstante legante en la tutmonda gazetaro kaj aŭskultante tra la internaciaj radioj, ke nia izoleco kaj neakcepto de la eŭropaj institucioj okazis pro la manko de politika libereco en nia malfeliĉa lando. Jam de 5 jaroj ni havas parlamenton rekte elektitan de la loĝantaro, kaj ĝis nun oni akceptis nin nur en NATO. Oni demokratece permesas al ni esti soldatoj, sen scii pri kia kaŭzo. Ekzemple en la Komuna Eŭropa Merkato ni perdis poziciojn en nia traktado dum la lastaj jaroj. Ni okupis pli bonan en 1970, sed laste oni forprenis al ni tiajn avantaĝojn. Ĉe ni oni diras, ke se Franco ankoraŭ regus ĉe ni, eble ni jam estus interne de K.E.M. Ĉu vere ?

Ĝibraltaro estas hispana teritorio, preskaŭ la lasta kolonia teritorio en la mondo. Dum Franco la angloj ne volis solvi la aferon pro manko de libereco ĉe ni. Nun pro kio ?

De la komenco la vaskaj teroristoj de ETA estis karese flegataj en la franca teritorio, por ke ili venu al nia

(fino p.35)

# laŭtaj informoj kaj petoj

**Franca-Hispana Renkontiĝo**

Novbakitaj esperantistoj el Sudokcidenta Francujo aranĝas provvojaĝon eksterlanden. Ili invitas ĉiujn esperantistojn en JACA, Aragón, Hispanujo, 1 calle de Arco, la 16an kaj 17an de oktobro. Bv. ekrilati kun : J. Decobert, 45 av. Béziou, F 64140 BILLERE Tel : 16(59)32 55 93. (kelkfoje respondas).

**Radio-Agora** (Montpellier) : F.O.L. Fédération des Oeuvres Laïques, elsendas ĉiuĵaŭde duonhoron pri Esperanto je taŭga horo (12h15).

**Pikniko en Argelès-sur-Mer**

Ĉe la vilao de Llech-Walter "Sunradio" en Argelès okazis la 22an de aŭgusto la tradicia pikniko. Belgion reprezentis S-ro Boumal kaj Nederlandon S-ro Van Gestel. S-ino Lloancy, agregacia profesorino en Pau, kiu preparas tezon pri R. Schwartz, partoprenis kun la familio. Novaj lernantinoj : S-inoj Baixaq, Gouges, Manguine kaj Payret kantis esperante kaj katalune.

Belega vetero permesis la ĝuon de bona banado kaj kun bonega apetito ĉiuj partoprenis la piknikon post trinkado de la "sangria", donacita de la prezidanto Llech-Walter.

Post la tagmanĝo okazis diskutado pri pedagogiaj aferoj kaj pri la baldaŭa malfermo de la kursoj.

**Komuniko de la Komitato de SAT-Amikaro :**

Laŭ propono de la Ĝirondia Grupo de Esperantistaj laboristoj, ni ĉiuj konsilas al la ceteraj grupoj, kaj ankaŭ al izolitaj aktivuloj, skribi en oktobro al : Monsieur le Président du Groupe Socialiste à l'Assemblée Nationale, Palais Bourbon, 126 rue de l'Université, 75005 PARIS, por atentigi lin pri la leĝproponoj 1667 kaj 1550 - nun kadukiĝintaj - kaj la promeso de la kandidato Mitterrand.

Oni bonvolu peti de la Prezidanto de la Socialista Grupo denove pritrakti la aferon, por ke estiĝu leĝ-

projekto por instruado de Esperanto kiel elektebla lernobjekto en duagrada kaj supera instruado.
Estas ankaŭ eble atentigi pri la jaro 1983, kiun Unuiĝintaj Nacioj proklamis Monda Jaro pri Komunikado.

*****************************************************

EDUKA ROLO DE ŜAKO
oooooooooooooooooooo

La psikologia intereso de ŝako estas konsiderinda. Multe da landoj komprenis tion kaj enkondukis la ŝakludon en la ĝeneralan kulturon kaj la junularan formadon. La devigo ekzameni ĉiuokaze la problemojn, kiuj ekzistas dum la partio, eliminas la hazardon kaj disvolviĝas la gusto al la precizeco. Tiel la ŝakludanto, per konstanta disciplino, edukas la ŝancon. La imago, la decidemo, la sinregado, la responseca senco kaj la peno pri abstrakteco, kiujn disvolvas la saĝa ŝakpraktikado, lertigas la infanan kreopotencon kaj donas al la adoleskanto efikan rimedon por plibonigi lian pensan metodon, stimulante lian volon. En siaj "Memoraĵoj", Benjamin Franklin prezentas la ŝakludon kiel kulturan rimedon altkvalitan. Por Voltaire, ĝi estas la ludo, kiu eminente honoras la spiriton. Kvankam Leibnitz konsideras ĝin kiel sciencon, por Goethe, ŝakludo estas inteligenteca provilo. Pli didaktike Lenin rekomendis ĝin kiel faktoron de la homoplialteco kaj luktoformadon por la revoluciulo. Einstein uzis ŝakon por demonstri la kvaran dimension.
Pri ŝako la ideo elpuŝas la kalkulon, la spirito regas la materion. Grava estas la personeco de la ŝakludanto. Ĝi estas la plej riĉa el ĉiuj ludoj : la ŝakludantoj same vidas la tutan partion, do la interveno de la hazardo estas nula.

o o
o

KIO ESTAS E.Ŝ.L.I ?
oooooooooooooooooooo

"ESPERANTA ŜAK-LIGO INTERNACIA" estas organizaĵo, kies ĉefaj celoj estas :
- grupigi ĉiujn ŝakludantojn, kiuj konas la internacian lingvon Esperanto ;
- propagandi Esperanton inter la ŝakludantojn en la tuta mondo.

Do mi petas ĉiujn samideanojn, kiuj ludas ŝakon, konatigi sin al Yvon POUPEAU 611, Quartier Galilée, F 77190 DAMMARIE LES LYS. Tel:(6) 439 48 50.
Same, se vi konas ŝakludantojn en via ĉirkaŭantaro, bonvolu informi ilin pri EŜLI.
La Esperanta Ŝak-Grupo Franca grandiĝas. Ni ludas ŝakon en la tuta mondo per leteroj, kaj samtempe ni komunikas inter ni pri iaj ajn aferoj.

Y. P.



''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''

Ĝ I R O N D I O

La Ĝirondia Grupo de Esp. Laboristoj kunvenos Marde, la 28an de septembro, je la 19a, en la Junuldomo de CENON-Palmer.
Atentu! Esceptokaze, ĉar la loko kaj dato de la oktobra kunveno de la ĝirondia grupo ne estis fiksitaj, ne eblos ĝin anonci per "Laŭte!". Niaj ĝirondiaj geamikoj ĉeestontaj la septembran kunvenon, kiam oni decidos pri la oktobra rendevuo, bonvolu informi la ceterajn grupanojn telefone aŭ letere. Dankon.

A Ĝ E N I O

Meznombre 5 personoj partoprenis la du aŭgustajn semajnfinojn en Laroque-Timbaut. Krom Suzana restadis la ceterajn tagojn. Sume, amaso da laboro estis plenumita por la broŝurservo; ni fiksis la temojn por la venontaj debatoj (ĉenleteraj), nome :
- "Kiel vivantigi Esperanto-gazeton?"
- "La modo"
- "Kiel varbi por Esperanto?"
Enkondukoj estos bonvenaj ! Dankon al ĉiuj, kiuj eltenis la broŝuradon kaj...la broŝurulon!




LA ZAMENHOFA TAGO ĈI-JARA en Akvitanio okazos proksime de Ste-Foy-la-Grande, krom se alvenus alia propono. Pli detalaj informoj pri tio aperos en la venonta numero. Ili trafu la redaktejon nepre antaŭ la fino de novembro !

*****************************************************

En la venonta, novembra/decembra, n-ro - aparte dika - aperos la fino de "Tra la mondo per biciklo" kaj la porinfana paĝo, kiuj ne trovis lokon en tiu ĉi numero. Red.

## Kiel uzi "SIA"

SUBJEKTO : LI (SENĈAPELULO DRINKIS... KAJ FRAPAS !)

| | |
|---|---|
| Mi batas mian hundon per mia bastono  | LI BATAS SIAN HUNDON PER SIA BASTONO |
| Mi batas vian hundon per mia bastono  | LI BATAS LIAN HUNDON PER SIA BASTONO |
| Mi batas mian hundon per via bastono  | LI BATAS SIAN HUNDON PER LIA BASTONO |
| Mi batas vian hundon per via bastono  | LI BATAS LIAN HUNDON PER LIA BASTONO |



lando por murdi por la libereco de la lando. Ili daŭrigas same flegataj ĉe la najbara lando kaj ili plu murdas. Kaj vivu la demokratio !

Ĉiutage kreskas en Hispanio la nombro de la seriozaj personoj, kiuj fervore opinias, ke la "teruraj 40 jaroj" ne estis tiom teruraj, kaj ke la internacia politiko estas la plej granda mensogo, kiu ekzistas en la mondo.

Aureli Ribalta (Barcelono)

Maljunulo rakontas : URBA POLICISTO

Dum mia longa metiado mi bezonis aŭtomobilon por veturigi multaj kaj ofte pezajn aparatojn. Iun tagon mi haltigis mian aŭton antaŭ domo, kie proksime staras policisto - mi pensis, por fari sian laboron. Sed mi ne sciis, ke mia vizaĝo aŭ mia veturilo ne plaĉas al li. Post mia eniro en la domo de mia kliento li proksimiĝis al mia veturilo kaj faris punbileton ...sen vera kaŭzo.

Hazarde, la saman tagon, alvenis al mia laborejo sinjoro kun malgranda radioaparato por riparigi kaj,registrante lian nomon, profesion kaj adreson, mi eksciis, ke li estas policisto. Mi kutime pagigis kvaroble mian laboron al policistoj, por ke la punbiletoj de policistoj estu pagataj de ili mem. De vorto al alia li proponis "nuligi" mian punbileton.

Dum kelka tempo tiu oficisto alportis aliajn aparatojn por riparigi, dirante, ke ili apartenas al kolego, sekretariino, estro, ktp, ĉiam sen pagi la laboron kaj akceptante punbiletojn por "nuligado".

De iu tago li ne plu venis kaj mi ricevis inviton iri al la estro de la servo pri monpunoj. Tie la oficisto prezentis al mi tre dikan stakon da punbiletoj, kiujn por pagi mi devus vendi ĉiujn miajn havaĵojn post 40 - 50 jaroj da streĉa laboro !... Tre malfeliĉa mi revenis hejmen, sen kuraĝo vivi kaj labori...

Kun tempo venas konsilo...

La sekvantan tagon mortis nia ŝtatprezidento kaj lia posteulo komencis sian oficon per amnestio kaj nuligado de aŭtomobilaj monpunoj...

\- nn -

*La veronta numero aperos fine de novembro.*




Gérant & imprimeur : Baudé, F 47340 Laroque Timbaut
Commission paritaire 58 651